

Francisco Valdomiro Lorenz

Ney da Silva Pinheiro

I — UM PERFIL BIOGRÁFICO

A passagem de Francisco Valdomiro Lorenz pela Terra ficou assinalada por um facho luminoso formado pelo calor do seu magnânimo coração e pelas luzes de sua sabedoria. Foi um espírito de elite que dignificou com sua presença a espécie humana. Sua estatura espiritual, a substância positiva de sua personalidade, não pode ser mensurada com os padrões convencionais do mundo em que vivemos, em que os valores são entendidos e vistos por outros ângulos.

Simples, impressionou pela bondade e pela sabedoria. Foi um homem antecipado no tempo, foi bem um protótipo do cidadão do futuro.

Nós fomos dos que o respiraram de perto, nos últimos anos de sua vida laboriosa, exemplo de correção e bondade, de temperança e doçura.

Quando fechou os olhos às lutas redentoras do mundo, voltando à região da verdade sem mescla, ainda sob o impacto do acontecimento, escrevamos, ao impulso das emoções reprimidas, para a revista "A Reencarnação", da Federação Espí-

Francisco Valdomiro Lorenz

Ney da Silva Pinheiro

I — BIOGRAFIA SKIZO

La paso de Francisco Valdomiro Lorenz sur la Tero restis markita per ia luma fasko estigita de la varmeco de lia grandanimeco kaj la lumoj de lia saĝo. Li estis nobla spirito, kiu dignigis la homaron per sia ĉeesto. Lia spirita staturo, la pozitiva substanco de lia personeco, ne povas ja esti mezurata per la konvenciaj normoj de la mondo, en kiu ni vivas kaj en kiu la valoroj estas komprenataj kaj vidataj el aliaj anguloj.

Estante simpla, li impresis per siaj bonkoreco kaj saĝo. Li estis homo antaŭirinta sian tempon; li estis ĝustedire ia prototipo de la civitano de la estonteco.

Ni apartenas al la nombro de tiuj homoj, kiuj ĝuis lian ĉeeston en la lastaj jaroj de lia laborplena vivo, ekzemplo de korekteco kaj bonkoreco, de ekvilibro kaj dolĉeco.

Kiam li fermis la okulojn al la elaĉetaĵ luktoj en la mondo, revenante al la regiono de la pura vero, ankoraŭ konsternita de la evento ni verkis por la revuo "A Reencarnação" (La Reenkarniĝo)

rita do Rio Grande do Sul, estas palavras que traduzem um pouco da admiração e da saudade dos que lhe sobrevivem:

“Há bem poucos meses, quando fomos sentir de perto o influxo espiritual do coração generoso de Francisco Valdomiro Lorenz, como habitualmente fazíamos, desde que o velho amigo transferira residência de Dom Feliciano para esta Capital, escrevíamos as palavras que seguem, ainda sob a impressão da enfermidade que veio vitimá-lo a 24 de maio último:

Voltamos a visitar o velho e querido espiritualista, em um destes domingos passados. Como da vez anterior, encontramos-lo perdido no mundo nebuloso de inibições que lhe acarretara um implacável acidente vascular cerebral.

O conhecido escritor espiritualista, cujos livros correm todo o Brasil, o insigne poliglota está contando, talvez, os seus últimos dias neste plano, onde soube dignificar a espécie humana com os frutos de sua inteligência e o calor do seu amantíssimo coração, e onde, numa vida cheia de trabalho e sacrifício sem par, irradiou, sobre todos os que lhe aproximavam, exemplos de bondade, simplicidade, tolerância e trabalho honrado.

Votamos, sempre, a Lorenz, uma admiração incomum, mesmo antes de conhecê-lo, pessoalmente, pois que sua alma, retratada em sua polimorfa obra bibliográfica, conquistou-nos as simpatias, desde os primeiros contatos.

O seu fecundo labor em prol da causa espiritualista, a que dedicou todas as suas energias, até o dia em que caiu algemado por inclemente derrame cerebral, o credencia como um obreiro de van-

de la Spiritisma Federacio de Rio Grande do Sul, la jenajn vortojn, kiuj tradukas iomete la admiron kaj resopiron de tiuj, kiuj postvivis lin:

“Antaŭ tre malmultaj monatoj, kiam ni iris sperti de proksime la spiritan influon de la nobla koro de Francisco Valdomiro Lorenz, kiel ni kutime faris, ekde kiam la malnova amiko translokiĝis de Dom Feliciano al tiu ĉi ĉefurbo, ni skribis la jenajn vortojn, ankoraŭ sub la impreso de la malsano, kiu mortigis lin en la 24-a de Majo lasta:

Ni denove vizitis la maljunan kaj karan spiritualiston en unu el liaj lastaj dimanĉoj. Same kiel je la antaŭa fojo, ni renkontis lin perdita en la nebula mondo de inhibicioj kaŭzitaj de violenta vaskula difekto.

La konata spiritualisma verkisto, kies libroj trakuras la tutan Brazilon, la eminenta poligloto eble kalkulas siajn lastajn tagojn en tiu ĉi sfero, kie li sciis honori la homaron per la fruktoj de sia inteligento kaj la varmo de sia tre amanta koro, kaj kie, per ia vivo plena de laboro kaj nekomparebla sinofero, li disradiis al ĉiuj, kiuj alproksimiĝis al li, bonecon, simplecon, toleremon kaj honoran laboron.

Al Lorenz ni ĉiam dediĉis ian neordinaran admiron, eĉ antaŭ ol koni lin persone, ĉar lia animo speguliĝinta en lia polimorfa verkaro konkeris nian simpatian jam de la unuaj kontaktoj.

Lia fekunda laboro favore por la spiritualisma afero, al kiu li dediĉis ĉiujn siajn energiojn ĝis la tago en kiu li falis pro senkompata cerba hemoragio,

guarda, a quem somos devedores do penhor do nosso reconhecimento e da nossa estima.

Hoje, podemos escrever estas cousas sem medo de ferir a sua modéstia peculiar, pois que apenas sabe sorrir, algemado ao veículo físico que lhe entorpece a ação intelectual, impossibilitando-o de reconhecer e entender os que se lhe aproximam.

Nos raros e fugazes momentos de lucidez, o seu espírito revela, nas palavras e afirmações, aquele senso de vida, retidão e acendrada sabedoria, virtudes que assinalam sua marcante individualidade.

A sua brilhante luzerna, posta bem alto sobre o velador, durante fecundos anos de lutas e sacrifícios sem conta, vai apagando-se lentamente, e que seus admiradores, todos os que beberam em seus livros um pouco de sua sabedoria, não olvidem, com a presença do seu conforto, o trabalhador infatigável que vai extinguindo uma vida sabiamente vivida, — serenamente, — como sói acontecer com aqueles que têm a consciência tranqüila pelo dever cumprido.

É a hora, talvez, que se aproxima de expandir-se liberto das contingências da vida física, o servo diligente, ensaiando os passos rumo à Pátria Maior, para viver e agir na posse integral de suas possibilidades evolutivas.

Que as bênçãos dos céus infinitos desçam, com desvelo amorável, sobre o velho obreiro, quando no tempo, mais uma vez, assinala-se o crepúsculo dos seus anos de suores e cansaços nos labores da sementeira.

No dia 25 de maio, em nome da Federação Espírita do Rio Grande do Sul, proferimos, na

altigas lin al la rango de altvalora laboranto, al kiu ni ŝuldas dankon kaj estimon.

Hodiaŭ ni povas skribi ĉi tion, ne timante ofendi lian apartan modestecon, ĉar li nur scias rideti, katenita al la fizika korpo paralizanta lian intelekton, malebligante al li rekoni kaj kompreni tiujn, kiuj alproksimiĝas al li.

En la maloftaj kaj pasemaj momentoj de klarvido lia spirito montras, per paroloj kaj asertoj, vivokonscion, korektecon kaj rafinitan saĝon, virtutoj markantaj lian elstaran personecon.

Lia brila lumego, metita tre alten sur lampingon, dum fekundaj jaroj de sennombraj luktoj kaj oferoj, estingiĝas malrapide; kaj liaj admirantoj, ĉiuj, kiuj lernis el liaj libroj iom de lia saĝo, ne forgesu, ĉe siaj komfortaĵoj, la nelacigeblan laboranton, kiu finas sian vivon saĝe kaj serene travivitan, kiel kutime okazas al tiuj, kiuj havas konsciencon trankvilan pro la plenumita devo.

Eble alproksimiĝas la horo, kiam la diligenta servisto plivastiĝu libera de la eventualaĵoj de la fizika vivo, ekzercante la paŝojn direkte al la Pli Granda Patrujo, por tie vivi kaj agi en kompleta posedo de siaj evoluaj kapabloj.

Benoj el la senlimaj ĉieloj ame falu sur la maljunan laboranton, kiam unu fojon pli montriĝas en la tempo la krepusko de lia vivo plena de ŝvito kaj laco el la semado".

La 25-an de Majo, en la nomo de la Spiritisma Federacio de Stato Rio Grande do Sul, ni elpar-

Rádio Itay, as seguintes palavras em homenagem ao insigne espiritualista:

“Regressa à vida espiritual, ao término de uma jornada longa e laboriosa, o valoroso mestre Francisco Valdomiro Lorenz, ontem desencarnado, e a quem muito deve o mundo.

O desaparecimento desse ínclito lidador, do plano das formas tangíveis, abre nas fileiras dos valores legítimos, uma lacuna que dificilmente será preenchida.

Pela sua firmeza, pela sua fé inquebrantável de batalhador infatigável, pela sua alta estatura espiritual, manteve sempre desfraldada a bandeira do trabalho, da fraternidade, da humildade e da sabedoria, apesar das lutas e sacrifícios que por vezes, e não poucas, teve que enfrentar, o que fez sempre com energia e extrema bondade.

A passagem de Lorenz pelo plano terrestre ficará assinalada, indelevelmente, como a de um vulto de lídima estirpe espiritual.

O movimento esperantista perde em Valdomiro Lorenz uma das suas maiores expressões, um dos seus mais legítimos valores.

Esoterista de têmpera, deixa inúmeras obras que lhe celebrarão o nome e dirão algo de sua linhagem de espiritualista de vanguarda.

A Federação Espírita do Rio Grande do Sul que teve em Francisco Valdomiro Lorenz um grande amigo e a quem devota a maior admiração, — registra, aqui, ao trabalhador infatigável que ressurge para a verdadeira vida, a expressão de sua homenagem e do seu fraterno apreço.

lis ĉe la Radio Itay la jenajn vortojn, omaĝe al la eminenta spiritualisto:

“Revenas al la spirita vivo, ĉe la fino de sia longa kaj laborplena vojaĝo, la valora Majstro Francisco Valdomiro Lorenz, elkarniĝinta hieraŭ, kaj al kiu la mondo multe ŝuldas.

La forpaso de tiu glora batalanto, el la sfero de la tuŝeblaj formoj, vakigas, en la vico de la aŭtentikaj valoroj, postenon nur tre malfacile plenumotan.

Pro sia firmeco, pro sia neskiebla fido de nelacigebla batalanto, pro sia alta spirita staturo, li ĉiam alte tenis la flagon de laboro, de frateco, de humileco kaj de saĝo, malgraŭ la luktoj kaj oferoj, kiujn kelkfoje, kaj ne malofte, li devis alfronti, kion tamen li ĉiam faris kun energio kaj ekstrema boneco.

La paso de Lorenz tra la fizika sfero restos neforigeble markita kiel tiu de ia figuro de aŭtentika spirita raso.

La esperantista movado perdas, per la morto de Francisco Valdomiro Lorenz, unu el siaj plej gravaj reprezentantoj, unu el siaj plej aŭtentikaj valoroj.

Tre kompetenta esoteristo, li postlasas multenombrajn verkojn, kiuj disvastigos lian nomon kaj montros ion el lia rango de eminenta spiritualisto.

La Spiritisma Federacio de ŝtato Rio Grande do Sul, kiu havis en Francisco Valdomiro Lorenz grandan amikon, al kiu ĝi dediĉas plej grandan admiron, registras ĉi tie, al la nelacigebla laboranto reaperanta por la vera vivo, la esprimon de siaj omaĝo kaj frata estimo.

Pedimos a Deus que ampare o servo diligente que volta das poeiras do mundo, levando consigo a bagagem expressiva de suas realizações.

* * *

Em D. Feliciano, onde passou a maior parte de sua vida, foi um modesto Mestre-Escola, mas, nem por isso, deixou de projetar as luzes de sua cultura para o Brasil e para o Mundo.

Nós, que conhecemos de perto as condições de trabalho desse valoroso obreiro da verdade, só podemos entender a sua obra como manifestação de seus dotes mediúnicos.

Em uma meia-água, água-furtada,, à Rua Felicíssimo Azevedo, 420 (hoje fundo do prédio nº 422), onde viveu os restos dos seus dias, nesta Capital, contava apenas com um pequeno armário de livros, que não continha mais que trinta volumes, se tanto, e que era toda a sua biblioteca de consulta para os seus labores intelectuais, cuja versatilidade era de todos conhecida.

Perguntávamos a Lorenz, em certa oportunidade, como podia versar com segurança e riqueza de detalhes a tantos temas, — lingüísticos, esotéricos, espíritos e outros, com os modestos recursos bibliográficos de que dispunha, — tendo-nos confessado, humildemente, que muito devia à mediunidade.

Quando volveu à vida espiritual, a revista AOR, do Centro Esotérico Vivekananda, desta Capital, em seu número de julho/dezembro de 1957, escrevia sobre o nobre espiritualista:

“O Mestre insigne era uma criatura simples e bondosa. Era vivo, alegre, bem-humorado, cortês e fidalgo.

Ni petas al Dio, ke Li helpu sian diligentan serviston revenantan en la polvojn de la mondo, portante kun si la multesignifan pakaĵon de siaj verkoj.

* * *

En la urbeto Dom Feliciano, kie li pasigis la plej grandan parton de sia vivo, li estis modesta instruisto, sed malgraŭ tio li ne povis ne disradii la lumon de sia kulturo sur Brazilon kaj sur la Mondon.

Ni, kiu de proksime konis la laborkondiĉojn de tiu valora laboranto de la vero, ni nur povas kompreni lian verkon kiel manifestajon de liaj mediuj kapabloj.

En dometo je unuklina tegmento, ĉe la strato Felicíssimo Azevedo 420 (hodiaŭ malantaŭaĵo de la domo n-ro 422), kie li travivis siajn lastajn tagojn, en ĉi tiu ĉefurbo, li disponis je nur eta libroŝranko kun maksimume 30 volumoj, kaj kiuj konsistigis lian tutan bibliotekon por konsulto dum siaj intelektaj laboroj, kies diverseco estis al ĉiuj konata.

Iam ni demandis al Lorenz, kiel li povis pri-trakti kun sekureco kaj riĉeco de detaloj tiom multe da temoj — lingvistikaj, esoteraj, spiritismaj k. a., disponante nur tiujn modestajn bibliografiajn rimedojn, kaj li humile konfesis al ni, ke multon li ŝuldas al mediumeco.

Kiam li revenis al la spirita vivo, la revuo “AOR” de la Esotera Grupo Vivekananda, en tiu ĉi ĉefurbo, en sia numero de Julio-Dezembro 1957, skribis pri la nobla spiritualisto la jenon:

“La eminenta Majstro estis homo simpla kaj bona. Li estis vigla, gaja, bonhumora, ĝentila kaj nobla.

Que incentivo vê-lo, em plena carreira dos 80 anos, tão pleno de estuante vitalidade e vibração!

Discorria sobre variados assuntos e sempre tinha uma ocorrência vivida para ilustrar suas dissertações.

Nunca cogitando de recompensa material, seu grande deleite foi DAR, dar com despreocupação...

Ocultismo, astrologia, quiromancia, lingüística, Esperanto (em que era mestre), Homeopatia, contos, apólogos, poesia, astronomia etc. eram temas versados com segurança e profundidade.

Traduziu livros do sânscrito, hebraico, grego antigo, inglês, francês, italiano, chinês, japonês, árabe. Estudou o volapük (que antecedeu o Esperanto), o tupi-guarani, o mala e vinte idiomas dos povos americanos nativos.

Em sua erudição lingüística, verteu o versículo 16, do capítulo 3, do Evangelho de São João, em 70 idiomas. Para penetrar a grandiosa beleza do "Sermão da Montanha" no original, estudou o aramaico".

* * *

Francisco Valdomiro Lorenz, pela formação espiritualista que manifesta em sua obra, pela retidão de sua vida e pelos conhecimentos que tinha de diversas escolas espiritualistas, estudioso que foi do Esoterismo, do Espiritismo, da Teosofia, da Maçonaria e outras doutrinas, identificou-se com a verdade que todas elas manifestam, em diferentes aproximações, nas respectivas tecituras doutrinárias. Sua afinidade, porém, com o pensamento espírita é surpreendente, não obstante as suas atividades esotéricas de toda uma vida e

Kiom stimula estis vidi lin 80-jara, tiel vigla kaj aktiva!

Li parolis flue pri diversaj temoj, kaj ĉiam havis travivaĵon por ilustri siajn konversaciojn.

Neniam celante ian materian rekompenco, al li ĉiam plaĉis DONI, doni senzorge...

Okultismo, astrologio, kiromancio, lingvistiko, Esperanto (kiun li majstris), homeopatio, rakontoj, apologoj, poezio, astronomio k.t.p. estis temoj de li sekure kaj profunde pritraktataj.

Li tradukis librojn el la sanskrita, hebrea, malnovgreka, angla, franca, itala, ĉina, japana, araba lingvoj. Li lernis Volapukon (kiu antaŭis Esperanton), la tupia-gvaranian, la majaan kaj dudek idiomajn de la indiĝenaj amerikaj gentoj.

Dank'al sia lingvistika erudicio, li tradukis la paragrafon 16-an de la ĉapitro 3-a de la Evangelio de Sankta Johano en 70 lingvojn. Por penetri en la grandiozan belecon de la "Prediko sur la Monto" en ĝia originalo, li lernis la aramean lingvon.

Pro la spiritualisma karaktero manifestiganta en lia verko, pro sia korekteco kaj pro la konoj, kiujn li posedis pri pluraj spiritualismaj skoloj, kaj ankaŭ pro tio, ke li studadis esoterismon kaj Spiritismon, teozofion, framasonismon kaj aliajn doktrinojn, Francisco Valdomiro Lorenz identigis kun la vero, kiun tiuj sistemoj diversmaniere prezentas en siaj respektivaj instruoj. Sed lia afineco kun la spiritisma pensmaniero estas mirinda, malgraŭ liaj dumvivaj esoteraj aktivecoj kaj

a sua dilatada colaboração ao Círculo Esotérico da Comunhão do Pensamento, onde é considerado um dos Mestres da ordem.

No seu livro "Raios de Luz Espiritual — Ensinos Esotéricos", que reúne magníficos trabalhos do mais alto interesse, à página 14, da 2a. edição da Editora "Pensamento", São Paulo, escreve judiciosamente: "Assim, como nas escolas não se deve desprezar os alunos, por serem de classes diferentes, também na Grande Escola da Vida há necessidade de numerosas classes e graus". É a manifestação de um espiritualismo universalista que perlustrou, insistentemente, em sua vida.

Conceitua o Espiritismo nesse livro, fazendo suas as palavras da mensagem recebida por Francisco Cândido Xavier, em 18 de abril de 1943, do Espírito de Emmanuel, que ele, ali, chama de sábio espírito.

A essa mensagem, que conclui com estas palavras: "A Codificação trouxe ao mundo uma chave gloriosa, cuja utilidade se adapta a diversas portas...", — aduziu Lorenz esta afirmação: "A finalidade nobilíssima que, nessa mensagem, o elevado espírito de Emmanuel aponta aos espíritos, é a mesma que é indicada pelo Espiritualismo Esotérico: A vida eterna, com eterna libertação".

A sua interpretação das teses fundamentais do Espiritismo, tais como as vidas sucessivas (reencarnação), a mediunidade, a comunicação dos espíritos, a sobrevivência, a pluralidade dos mundos habitados e outras, são páginas de magnífico enfoque doutrinário, que o aproxima, inteiramente, do ângulo de interpretação espírita e que o identifica como um estudioso conhecedor da Doutrina Espírita.

lia senĉesa kunlaborado kun la "Círculo Esotérico Comunhão do Pensamento" (Esotera Rondo Komuneco de Penso), kie li estas konsiderata kiel unu el la Majstroj de tiu ordeno.

Sur la paĝo 14-a de sia libro "Radioj de Spiritismo — Esoteraj Instruoj" (2-a eldono, Editora "Pensamento", São Paulo), enhavanta plej interesajn verkojn, li saĝe diras: "Kiel en la lernejoj oni ne devas malestimi la lernantojn apartenantajn al malsamaj klasoj, tiel same en la Granda Lernejo de la Vivo estas necesaj pluraj klasoj kaj gradoj". Tio estas la manifestiĝo de ia universala spiritismo, kiun li senĉese nutris dum la vivo.

En tiu libro li difinas Spiritismon, farante siajn la vortojn el la mesaĝo, kiun Francisco Cândido Xavier mediume ricevis, la 18-an de Aprilo 1943, de la Spirito Emmanuel, kiun Lorenz tie nomas sanga Spirito.

Al tiu mesaĝo finiĝanta per tiuj ĉi vortoj: "La Kodigado alportis al la mondo ian gloran ŝlosilon, kiu adaptiĝas al diversaj pordoj...", Lorenz aldonis la jenan aserton: "La tre nobla celo, kiun la supera Spirito Emmanuel montras al la spiritistoj en tiu ĉi mesaĝo, estas ja tiu sama indikita de la Esotera Spiritismo: La eterna vivo kun eterna liberiĝo".

Lia interpreto pri la fundamentaj tezoj de Spiritismo, kiel ekzemple tiu pri la sinsekvaj vivoj (reinkarniĝo), mediumeco, komuniko de spiritoj, la vivo post la morto, la plureco de la loĝataj mondoj kaj aliaj estas paĝoj je eksterordinara doktrina intereso, lin intime alproksimigantaj al la spiritisma interpreto kaj vidigantaj lin kiel diligentan konanton de la Spiritisma Doktrino.

No seu extraordinário "A Voz do Antigo Egito", em que relata e analisa as famosas mensagens recebidas em língua morta do Egito Antigo, a sua vocação exegetico-espiritica se revela ao declarar: "A única explicação admissível, deste fenômeno, é a da Doutrina Espirita sobre a alma imortal, que existe eternamente, reencarnando-se periodicamente em corpo material, porém conservando no seu organismo espiritual as recordações das vidas anteriores..."

E acrescenta: "As comunicações, dadas em egípcio faraônico, não podem ser atribuídas à telepatia, porque ninguém, dos "vivos", sabia manejar a *pronúncia* egípcia, quando Nona, e, mais tarde, Rosemary, em transe, nessa língua conversavam". (Cap. VIII, 2a. Parte).

Por norma indefectível de coerência e lealdade, temos que declarar que Francisco Valdomiro Lorenz repartiu sua atividade, sabiamente, entre o Esoterismo e o Espiritismo, realizando um verdadeiro ecletismo espiritual, tão a sabor de suas concepções universalistas de vida, por lhe ser difícil sujeitar o espírito, habituado a acendrados vãos e ao descortínio de amplos horizontes, fascinado pela visão cósmica da vida.

No seu notável trabalho, no entanto, a sua obra espírita, que não foi fragmentária, ou ocasional, o faz credor de nossa admiração e reconhecidos ao seu inequívoco testemunho.

En lia bonega libro "La Voĉo de la Antikva Egiptujo", kie li raportas kaj analizas la famkonatajn mesaĝojn ricevitaĵojn en mortinta lingvo de la Antikva Egiptujo, lia ekzegeza-spiritisma inklinado sin manifestas, kiam li deklaras: "La sola akceptebla klarigo de tiu fenomeno estas tiu, donata de la Spiritisma Doktrino pri la senmorta animo ekzistanta eterne kaj reenkariga periodo en materialan korpon, sed kiu en sia spirita organismo konservas la rememorojn pri la antaŭaj vivoj..."

Kaj li aldonas: "La komunikaĵoj donitaj en faraona egipta lingvo ne povas esti atribuitaj al telepatio, ĉar neniu, el inter la "vivantoj", scipovis la egiptan prononcon, kiam Nona, kaj poste Rosemary, en tranco, konversaciis en tiu lingvo". (Ĉapitro VIII, 2-a parto).

Kiel normo de nepre logiko kaj lojaleco, ni devas deklari, ke Francisco Valdomiro Lorenz saĝe dividis sian agadon inter Esoterismo kaj Spiritismo, realigante aŭtentikan spiritualan ekletikismon, laŭ la gusto de siaj universalismaj vivokonceptoj, ĉar al li estis malfacile submeti sian spiriton, al kutimiĝintan al altaj flugoj kaj al la vasteco de larĝaj horizontoj, fascinitan de la kosma vidaĵo de la vivo.

Sed meze en lia notinda verkaro, lia spiritisma verko, kiu ne estis fragmenta nek eventuala, faras lin inda je nia admiro kaj danko.

II — DATAS E FATOS RELEVANTES

1872 — Francisco Valdomiro Lorenz nasce a 24 de dezembro, às 23 horas e 12 minutos, na aldeia de Zbislav, perto da cidade de Tcháslav, região da Boêmia, na Checoslováquia, filho de Francisco Lorenz e Tereza Lorenz, pessoas de origem humilde, vivendo seu pai da profissão de moleiro.

Aos quatro anos, já lia os jornais da localidade, porém, seus estudos, do grupo escolar ao ginásio, foram pontilhados de lutas e sacrifícios de toda a ordem, pela extrema pobreza de vida.

1889 — Nesta época, com apenas 17 anos, já dominava todas as línguas eslavas, além do latim, do hebraico e do grego. Também estudava o chinês, de que foi tradutor oficial na Checoslováquia, o inglês, o francês, o italiano e o árabe, bem como os idiomas artificiais: o volapuque e o Esperanto, tendo sido um dos fundadores da Sociedade Universal de Esperanto. Manteve correspondência com Lázaro Luís Zamenhof.

Nessa época, ainda muito jovem, aconteceu um fato muito significativo em sua vida. Convidado por um colega, compareceu a uma sessão espírita, levado mais pela curiosidade. Uma Entidade comunica-se e dirige-se ao visitante rendendo-lhe homenagem e esclarecendo ao final: "Atravessarás os mares, separar-te-ão dos teus, e a ti milhares deverão suas luzes espirituais".

Efetivamente, passaram-se os anos e fuge ele, precipitadamente, para o Brasil, sem tempo mesmo para despedir-se dos seus. De Lisboa enviou um cartão aos seus pais, com os seguintes dizeres: "Meus pais, o destino me leva além dos mares. Adeus!" E nunca mais voltou ao Velho Continente.

II — GRAVAJ DATOJ KAJ FAKTOJ

1872 — Francisco Valdomiro Lorenz naskiĝis la 24-an de Decembro, je la 23-a horo kaj 12 minutoj, en la vilaĝo Zbislav, proksime de la urbo Tcháslav, Bohemujo, en Ĉeĥoslovakujo, kiel filo de Francisco Lorenz kaj Tereza Lorenz, ambaŭ homoj de humila deveno. La patro havis la metion de mue-listo.

En sia 4-jara aĝo, li jam legis la lokajn ĵurnalojn sed liaj studoj ĉe elementa lernejo kaj gimnazio estas markitaj per luktoj kaj oferoj ĉaspecaj, por la ekstrema malriĉeco de lia vivo.

1889 — En tiu tempo, havante nur 17 jarojn, li jam posedis ĉiujn slavajn lingvojn, krom ankaŭ la latina, la hebrea kaj la greka. Li studis ankaŭ la ĉinan, fariĝinte mem oficiala tradukisto en Ĉeĥoslovakujo, la anglan, la francan, la italan kaj la araban, kaj krome la artefaritajn idiomojn: Volapukon kaj Esperanton. Li korespondadis kun Lázaro Ludoviko Zamenhof.

En tiu tempo, kiam li ankoraŭ estis tre juna, okazis tre grava fakto en lia vivo. Invite de kolego, li ĉeestis spiritisman seancon, movite precipe de scivolemo. Iu Spirito sin manifestas kaj direktiĝas al la vizitanto, lin ĝentile salutas kaj fine klarigas: "Vi traveturos la marojn, oni apartigos vin je la viaj, kaj miloj da homoj ŝuldos al vi spiritajn lumojn".

Efektive, la jaroj pasas kaj li rapide fuĝas en Brazilon, eĉ ne disponante tempon por adiaŭi la siajn. De Lisbono li sendis karton al siaj gepatroj, kun la jenaj vortoj: "Miaj gepatroj, la destino forportas min trans la marojn. Adiaŭ!" Kaj neniam plu li revenis la Malvonan Kontinenton.

1890 — Escreve o seu primeiro livro sobre Esperanto, com o título de “Plena Lernolibro de Esperanto por Ĉeĥoj”, publicado na Boêmia, apenas três anos após o aparecimento do novo idioma.

1891 — Deixa a sua pátria, onde as suas idéias religiosas e seu ideal de política democrática eram proibidos pelo Governo Federal da Áustria, sob cuja dominação se encontrava a Checoslováquia. Na viagem transatlântica, estuda português e, ao chegar ao Rio de Janeiro, é escalado como intérprete de seus companheiros de jornada. Logo após a sua chegada às terras brasileiras, esteve trabalhando nas Minas de Ouro de Morro Velho e em Mariana, no Estado de Minas Gerais. Viajando para o Rio Grande do Sul, residiu em Porto Alegre, no subúrbio de Cristal, trabalhando como intérprete da corrente migratória que ali se fixara.

Mais tarde, a conselho médico, mudou-se para o interior do Estado, fixando residência definitiva em Dom Feliciano, então 3º Distrito do Município de Encruzilhada do Sul, hoje município, onde se casou e constituiu família, exercendo aí as profissões de agricultor e professor.

1894 — Em Dom Feliciano, veio a conhecer a jovem Ida Krascheffski, que para ali imigrara com sete anos de idade, natural de Birkenfeld, Prússia Oriental (Alemanha), perto de Dantzig, onde nascera a 5 de maio de 1879, tendo-a desposado quando a jovem Ida contava 15 anos de idade, passando, desde aí, a adotar o nome de Ida Lorenz. Criou dez filhos legítimos e vinte de criação. Foi sempre esposa exemplar e laboriosa.

1906 — Neste ano, em 28 de junho, após lecionar por muitos anos como professor particular

1890 — Li verkas sian unuan libron pri Esperanto, sub la titolo “Plena Lernolibro de Esperanto por Ĉeĥoj”, eldonitan en Bohemujo, nur tri jarojn post la apero de la nova idioma.

1891 — Li forlasas sian patrujon, kie liaj religiaj ideoj kaj lia demokrata idealo estis malpermesitaj de la Imperia Guberniestro de Aŭstrujo, sub kies regado troviĝis Ĉeĥoslovakujo. Dum mara veturado li lernas la portugalan lingvon kaj, alvenante al Rio-de-Janeiro, li estas elektita kiel interpretisto de siaj vojaĝkunuloj. Tuj post sia alveno al Brazilo li laboris ĉe la orminejoj en Morro Velho kaj en Mariana, en la ŝtato Minas Gerais. Translokiĝinte al la ŝtato Rio Grande do Sul, li ekloĝis en Porto Alegre, en la antaŭurbo Cristal, kie li oficis kiel interpretisto de la enmigrintoj tie loĝantaj.

Poste, laŭ konsilo de kuracisto, li translokiĝis al la internlando de tiu ŝtato por fiksi sian definitivon loĝadon en la urbeto Dom Feliciano, tiam 3-a Distrikto de la komunumo Encruzilhada do Sul, kaj hodiaŭ komunumo mem, kie li edziĝis kaj fondis familion, laborante kiel terkulturisto kaj instruisto.

1894 — En Dom Feliciano li ekkonis la junulinon Ida Krascheffski, naskitan la 5-an de Majo 1879 en Birkenfeld, Orienta Prusujo (Germanujo), proksime al Dantzig, tien enmigrantan kiam ŝi estis 7-jara, kaj kun kiu li edziĝis, kiam ŝi aĝis 15 jarojn. Pro la edziniĝo, ŝi adoptis la nomon Ida Lorenz. Ŝi naskis 10 infanojn kaj adoptis 20 aliajn. Ŝi ĉiam estis edzino modela kaj laborema.

1906 — En tiu ĉi jaro, la 28-an de Junio, post multjara laboro kiel privata (kaj kelkatempa ofi-

(e interino desde 1903), é nomeado professor estadual efetivo, em virtude de ter sido aprovado em concurso, quando a todos surpreendeu pela sua grande cultura. Percorrendo seis quilômetros por dia, comparece, diariamente, à Escola, durante 33 anos.

1929 — Lorenz conquista grande autoridade a respeito de assuntos lingüísticos com o lançamento de sua obra "Iniciação Lingüística", pela Editora "Pensamento", de São Paulo. Conhecia bem nessa época, cerca de 80 idiomas diferentes, do Ocidente e do Oriente, antigos e modernos, inclusive o vetusto sânscrito, do qual fez brilhante tradução, em versos no mesmo ritmo do original, do famoso "Bhagavad Gîtâ", a "Sublime Canção da Imortalidade", que é parte do célebre "Mahabharata", a Escritura Sagrada dos Brâmanes. Desse livro disse Guilherme de Humboldt ser "a mais profunda, talvez a mais sublime cousa que o mundo jamais produziu". Lorenz, ao morrer, conhecia 104 idiomas.

1944 — Falece, em Dom Feliciano, a 15 de agosto, sua esposa Ida Lorenz, deixando os seguintes filhos e filhas: Otto, Ricardo, Carlos, Waldomiro, Paulo, Augusta, Emma, Carolina, Anna e Martha.

1949 — Casa-se, em segundas núpcias, com Dona Francisca Schumann Lorenz, com quem não teve filhos.

1957 — Vitimado por uma trombose cerebral, desencarna a 24 de maio, à Rua Felicíssimo Azevedo, 420, em Porto Alegre, capital do Estado do Rio Grande do Sul, para onde havia transferido residência, vindo de Dom Feliciano.

ciala) instruisto, li estas nomata kiel ŝtata efektiva instruisto pro sia aprobiĝo en konkurso, kiam li surprizis ĉiujn per sia vasta kulturo. Piedirante 6 kilometrojn po tage, li akurate iras al la Lernejo dum 33 jaroj, sen perdo de eĉ unu tago.

1929 — Per la lanĉo de sia "Iniciação Lingüística" ("Lingvistika Inicado") fare de la Eldonejo "Pensamento" el São Paulo, Lorenz konkeras grandan aŭtoritatecon pri lingvistikaj aferoj. En tiu tempo li bone posedis ĉirkaŭ 80 idiomojn de Okcidento kaj de Oriento, antikvajn kaj modernajn, inkluzive la antikvan sanskriton, el kiu li brile tradukis, en versoj kun la sama ritmo de la originalo, la mondfaman "Bhagavad-Gîtâ, tio estas, Sublima Kanto pri la Senmorteco", kiu estas parto de la eminenta "Mahâbhârata", la sankta skribo de la bramanoj. Pri tiu libro diris Humboldt: "Ĝi estas la plej profunda kaj la plej sublima afero, kiun la mondo neniam antaŭe produktis". Ĉe sia morto, Lorenz scipovis 104 idiomojn.

1944 — La 15-an de Aŭgusto mortas en Dom Feliciano lia edzino Ida Lorenz, postlasante la jenajn gefilojn: Otto, Ricardo, Carlos, Waldomiro, Paulo, Augusta, Emma, Carolina, Anna kaj Martha.

1949 — Lorenz ree edziĝas kun S-ino Francisca Schumann Lorenz, kiu al li naskis nenian infanon.

1957 — Viktimo de cerba trombozo, li elkar-niĝis la 24-an de Majo, ĉe la strato Felicíssimo Azevedo 420, en Porto Alegre, ĉefurbo de Stato Rio Grande do Sul, kien li estis translokiĝinta de la urbo Dom Feliciano.

“Três dias antes de sua partida, um de nossos amigos recebeu da Rádio Roma um pedido de notas biográficas para uma homenagem que a Rádio oficial da Itália lhe iria prestar, pelo fato de ser ele então o mais antigo esperantista vivo. Esses dados foram logo remetidos por via aérea para o sr. Luigi Minnaja, que dirigia o programa de Esperanto naquela grande estação de rádio. A revista oficial da “Universala Esperanto-Asocio” publicou, em seu número de maio, que Lorenz era esperantista desde 1887, por isso a Rádio Roma lhe prestaria aquela homenagem. Antes, porém, de ser irradiado o programa, já se havia transformado em homenagem póstuma”. (8)

1962 — Chega ao Brasil, com o objetivo de investigar casos sugestivos de reencarnação, o Professor Doutor Ian Stevenson, ilustre Diretor do Departamento de Psiquiatria e Neurologia da Escola de Medicina da Universidade de Virgínia, nos Estados Unidos da América do Norte. Em nosso País, investigou sete casos, mas apenas dois deles mereceram apresentação em seu livro “Twenty Cases Suggestive of Reincarnation”, Proceedings of the American Society for Psychical Research, Volume XXVI, September, 1966, traduzido para o português, em lançamento da Editora Difusora Cultural, de São Paulo, em 1971, com o título “Vinte Casos Sugestivos de Reencarnação”.

Estes dois casos brasileiros ocorreram na família de Francisco Valdomiro Lorenz (casos de Marta e de Paulo Lorenz, seus filhos). As seguintes observações feitas pelo Prof. Stevenson, em seu famoso livro, interessarão aos estudiosos da vida do nosso biografado:

(8) Zéus Wantull, “Grandes Espíritos do Brasil”, Federação Espírita Brasileira, Rio, RJ, 1969, p. 339. — (Nota de N. S. P.)

“Tri tagojn antaŭ lia forpaso, unu el niaj amikoj ricevis de la Radio Roma peton, ke oni sendu al ĝi biografiajn notojn destinitajn al la omaĝo, kiun la oficiala Radio de Italujo faros al li, pro tio, ke li estas la plej malnova esperantisto vivanta. Tiuj notoj estis tuj senditaj per aerpoŝto al S-ro Luigi Minnaja, kiu gvidis la Esperanto-programon en tiu granda radistacio. En sia n-ro de Majo, la oficiala revuo de la Universala Esperanto-Asocio publikigis, ke Lorenz estas esperantisto ekde 1887, pro kio la Radio Roma faris al li tiun omaĝon. Sed antaŭ la dissendo de la programo, tiu omaĝo jam fariĝis postmorta”. (8)

1962 — Kun la celo esplori kazojn sugestantajn reenkarnejon, alvenas al Brazilo D-ro Ian Stevenson, eminenta Direktoro de la Departemento de Psikiatrio kaj Neŭrologio de la Medicina Lernejo de la Universitato en Virgínia, Usono. En nia lando li esploris sep kazojn, sed nur du el ili estas prezentitaj en lia libro “Twenty Cases Suggestive of Reincarnation”, Proceedings of the American Society for Psychical Research, Volume XXVI, September, kies portugallingva traduko estas eldonita de la Editora Difusora Cultural, São Paulo, en 1971, sub la titolo “Vinte Casos Sugestivos de Reencarnação” (Dudek Kazoj Sugestantaj Reenkarnejon).

Tiuj du brazilaj kazoj efektiviĝis ĉe la familio de Francisco Valdomiro Lorenz (kazoj de Marta kaj Paulo Lorenz, liaj gefiloj). Tre interesos la studemulojn de la vivo de Lorenz la jenaj rimarkoj faritaj de Prof. Stevenson en sia fama libro:

(8) Zéus Wantull, “Grandaj Spiritistoj de Brazilo”, Brazila Spiritisma Federacio, Rio, RJ, 1969, p. 339. (Noto de N. S. P.)

“O Sr. Lorenz tomou extensas notas do primeiro desses casos e, ao que parece, observou-os desde o início, com interesse não desprovido de espírito crítico. (...) guardava detalhadas anotações atualizadas do caso de sua filha Marta. Infelizmente estas notas perderam-se posteriormente, mas o Sr. Lorenz publicou um relato mais ou menos completo do caso de Marta em seu livro “A Voz do Antigo Egito”.

III — BIBLIOGRAFIA DE LORENZ

a) Obras espiritualistas

- 1 — CONTOS E APÓLOGOS, Editora “Pensamento”, 1918, 1a. ed., São Paulo.
- 2 — CHAMAS DE ÓDIO E A LUZ DO PURO AMOR, (Vida de João Huss), Ed. “Pensamento”, 2a. ed., 1940, São Paulo.
- 3 — O FILHO DE ZANONI, Ed. “Pensamento”, década de 20, São Paulo.
- 4 — MOISÉS E SIPHORAH, poema épico da vida de Moisés e sua mulher Siphorah — Ed. “Pensamento”, 1920, São Paulo.
- 5 — A SORTE REVELADA PELO HORÓSCOPO CABALÍSTICO, astrologia kabalística, Ed. “Pensamento”, 3a. ed., 1926, São Paulo.
- 6 — O JARDIM DA ALMA, contos e ensinios para a infância, Ed. “Pensamento”, 4a. ed., 1937, São Paulo.
- 7 — RAIOS DE LUZ ESPIRITUAL — ENSINOS ESOTÉRICOS, Ed. “Pensamento”, 2a. ed., 1949, São Paulo.
- 8 — A VOZ DO ANTIGO EGITO, Ed. FEB, 1946, 1959 e 1975, Rio, RJ.
- 9 — DIÁLOGOS INICIÁTICOS, Ed. “Pensamento”, São Paulo.
- 10 — KABALA, Ed. “Pensamento”, São Paulo.

“S-ro Lorenz faris longajn notojn pri la unua el tiuj kazoj, kaj, verŝajne, li observis ilin ekde ilia komenco, ne sen kritika intereso. (...) konservis detalajn notojn pri la kazo de sia filino Marta. Bedaŭrinde, tiuj notoj perdiĝis poste, sed S-ro Lorenz publikigis pli-malpli kompletan raporton pri la kazo de Marta en sia libro “La Voĉo de la Antikva Egiptujo”.

III — BIBLIOGRAFIO DE LORENZ

a) Spiritualismaj verkoj

- 1 — RAKONTOJ KAJ APOLOGOJ, Eldonejo “Pensamento”, 1918, 1-a eld., São Paulo.
- 2 — FLAMOJ EL MALAMO KAJ LUMO EL PURA AMO (Vivo de Johano Huss), Eldonejo “Pensamento”, 2-a eld., 1940, São Paulo.
- 3 — LA FILO DE ZANONI, Eldonejo “Pensamento”, dudekaj jaroj, São Paulo.
- 4 — MOSEO KAJ CIPORA, epsoa poemo pri la vivo de Moseo kaj lia edzino Cipora; Eld. “Pensamento” 1920, São Paulo.
- 5 — LA SORTO RIVELITA PER LA KABALA HOROSKOPO, kabala astrologio; Eld. “Pensamento”, 3-a eldono, 1926, São Paulo.
- 6 — LA ĜARDENO DE LA ANIMO, porinfanaj rakontoj kaj instruoj; E'd. “Pensamento”, 4-a eldono, 1937, São Paulo.
- 7 — RADIOJ DE SPIRITA LUMO — ESOTERAJ INSTRUOJ, Eld. “Pensamento”, 2-a eld., 1949, São Paulo.
- 8 — LA VOĈO DE LA ANTIKVA EGIPTUJO, Brazilia Spiritisma Federacio, 1946, 1959 kaj 1975, Rio de Janeiro, RJ.
- 9 — INICAJ DIALOGOJ, Eld. “Pensamento”, São Paulo.
- 10 — KABALO, Eld. “Pensamento”, São Paulo.

- 11 — UM APÓSTOLO DO PROGRESSO, vida notável de João Amos Comenius, de Lorenz com Fernando Azevedo, Ed. "Anuário do Brasil", Rio de Janeiro, RJ.
- 12 — ELEMENTOS DE QUIROMANCIA, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 13 — PEQUENO CONSULTÓRIO HERMÉTICO, noções de ciências herméticas, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 14 — KRISHNA, O SALVADOR DA ÍNDIA, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 15 — LIÇÕES PRÁTICAS DE OCULTISMO UTILITÁRIO, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 16 — MENSAGENS ROSACRUCIANAS (não aparece a autoria de Lorenz), Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 17 — VIAGENS NO MUNDO DOS ESPÍRITOS, não publicado.

b) Traduções (9)

- 18 — ZANONI, romance espiritualista de Sir Edward Bullwer Lyton, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 19 — BHAGAVAD GĪTĀ, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 20 — GNANI YOGA, de Yogi Ramacharaca, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 21 — RAJA YOGA, do Yogi Ramacharaca, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 22 — HATA YOGA, Ramacharaca, Ed. "Pensamento", São Paulo.

(9) Os livros a seguir numerados, de 20 a 28, não trazem o nome de Lorenz como tradutor. (Nota de N.S.P.)

- 11 — APOSTOLO DE LA PROGRESO, notinda vivo de Johano Amos Comenius, de Lorenz kaj Fernando Azevedo, Eld. "Anuário do Brasil", Rio de Janeiro, RJ.
- 12 — ELEMENTOJ DE KIROMANCIO, Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 13 — MALGRANDA HERMETIKA KONSULTEJO, nocioj pri hermetikaj sciencoj; Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 14 — KRIŝNO, LA SAVINTO DE HINDUJO; Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 15 — PRAKTIKAJ LECIONOJ PRI UTILECA OKULTISMO; Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 16 — ROZKRUCAJ MESAĜOJ (ne estas menciita la aŭtoreco de Lorenz); Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 17 — VOJAGOJ EN LA MONDO DE LA SPIRITOJ; ne publikigita.

b) Tradukoj (en la portugalan) (9)

- 18 — ZANONI, spiritualisma romano de Sir Edward Bulwer Lyton, Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 19 — BHAGAVAD GĪTĀ, Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 20 — GHANA-JOGO, de la jogio Ramacharaca, Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 21 — RAĜA-JOGO, de la jogio Ramacharaca; Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 22 — HATHA JOGO, de Ramacharaca, Eld. "Pensamento", São Paulo.

(9) La libroj ĉi tie numeritaj de 20 ĝis 28 ne montras la nomon de Lorenz kiel tradukinto. — (Noto de N.S.P.).

- 23 — A CIÊNCIA HINDU YOGUE DA RESPIRAÇÃO, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 24 — CURA PRÁTICA PELA ÁGUA, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 25 — A VIDA DEPOIS DA MORTE, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 26 — O CRISTIANISMO MÍSTICO, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 27 — A CIÊNCIA DA CURA PSÍQUICA, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 28 — CURSO ADIANTADO DE FILOSOFIA YOGA E OCULTISMO ORIENTAL, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 29 — QUATORZE LIÇÕES DE FILOSOFIA YOGA E OCULTISMO ORIENTAL, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 30 — ESTRÊNUA VIDA ESPIRITUAL E A VIDA SUBMISSA, de Van Der Naillen, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 31 — DA POBREZA AO PODER, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 32 — FILOSOFIA E RELIGIÕES DA ÍNDIA, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 33 — O RENASCIMENTO E A LEI DO CARMA, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 34 — AS DOUTRINAS EXOTÉRICAS DAS FILOSOFIAS E RELIGIÕES DA ÍNDIA, de Ramacharaca, Ed. "Pensamento", São Paulo.
- 35 — O LABIRINTO DO MUNDO E O PARAÍSO DO CORAÇÃO, em tcheco.

c) em Esperanto

- 36 — PLENA LERNOLIBRO DE ESPERANTO POR ĈEĤOJ, publicado na Boêmia em 1890. Seu primeiro livro publicado sobre Esperanto.

- 23 — LA HINDUISMA JOGO-SCIENCO PRI SPIRADO; Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 24 — PRAKTIKA RESANIGO PER AKVO; Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 25 — LA VIVO POST LA MORTO; Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 26 — LA MISTIKA KRISTANISMO; Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 27 — SCIENCO PRI LA PSIKA RESANIGO, Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 28 — PROGRESINTA KURSO DE JOGA FILOZOFIO KAJ ORIENTA OKULTISMO; Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 29 — DEKKVAR LECIONOJ PRI JOGO-FILOZOFIO KAJ ORIENTA OKULTISMO; Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 30 — AKTIVA SPIRITA VIVO KAJ LA SUBMETITA VIVO, de Van Der Naillen, Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 31 — DE MALRICECO AL REGADO, Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 32 — FILOZOFIO KAJ RELIGIOJ DE HINDUJO, Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 33 — RENESANCO KAJ LA LEGO DE KARMO, Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 34 — LA EKZOTERAJ DOKTRINOJ DE LA FILOZOFIOJ KAJ RELIGIOJ DE HINDUJO, Ramacharaca; Eld. "Pensamento", São Paulo.
- 35 — LA LABIRINTO DE LA MONDO KAJ LA PARADIZO DE LA KORO, en la ĉeĥan.

c) Esperanto

- 36 — PLENA LERNOLIBRO DE ESPERANTO POR ĈEĤOJ, publikigita en Bohemujo en 1890. Lia unua libro pri Esperanto.

- 37 — **ESPERANTO SEM MESTRE**, lançamento da FEB, Rio, RJ, em 1938 e 6a. edição em 1963. Obra completa em um só volume. Compreende gramática, exercícios, conversação, leitura em prosa e verso, vocabulários Esperanto-Português e Português-Esperanto, chaves dos exercícios, um quadro sobre o emprego dos participios e os provérbios mais usados pelos esperantistas de todos os países.
- 38 — **DIVERSKOLORA BUKEDETO**, coletânea de poemas traduzidos para o Esperanto de 40 línguas diferentes, antigas e modernas, orientais e ocidentais. O autor deixou uma segunda edição, não publicada, com poemas traduzidos de 100 línguas diferentes. É a mais ampla coleção até hoje traduzida por um só homem, poeta e poliglota de grande mérito (FEB, Rio, 1941).
- 39 — **VOĈOJ DE POETOJ EL LA SPIRITA MONDO**, FEB, Rio, 1944, dividido em 2 partes: a 1a. formada por 81 poesias de 6 autores espirituais, dentre eles, L. L. Zamenhof, recebidas em Esperanto pela mediunidade do próprio Lorenz; e a 2a. parte constituída de 18 poesias, de vários autores espirituais, traduzidas para o Esperanto do livro "Parnaso de Além-Túmulo", psicografado pelo médium Francisco Cândido Xavier, edição da FEB, Rio. A obra traz um longo prefácio de Ismael Gomes Braga sobre a mediunidade e Espiritismo. O valor literário desse livro foi posto em relevo por "La Nica Literatura Revuo", em seu número 5, de 1956, que transcreveu do mesmo dois poemetos como modelo de bela poesia.

- 37 — **ESPERANTO SEN INSTRUISTO**, eldono de la Brazila Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro, 1938, kaj 6-a eldono en 1963. Kompletav verko en nur unu volumo. Kun gramatiko, ekzercoj, konversacio, legaĵo en prozo kaj verso, vortaroj esperanta-portugala kaj portugala-esperanta, ŝlosiloj de la ekzercoj, kadro pri la uzo de la participoj kaj de proverboj pli uzataj de ĉiulandaj esperantistoj.
- 38 — **DIVERSKOLORA BUKEDETO**, kolekto da poemoj esperantigitaj el 40 lingvoj antikvaj kaj modernaj, orientaj kaj okcidentaj. La aŭtoro postlasis alian verkon esperantigitan el 100 malsamaj lingvoj. Ĝi estas la plej ampleksa kolekto ĝis hodiaŭ tradukita de unu sola homo, poeto kaj poligloto multmerita. (Brazila Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro, 1941).
- 39 — **VOĈOJ DE POETOJ EL LA SPIRITA MONDO**, Brazila Spiritisma Federacio, 1944, dividita en du partojn: la unua kun 81 poeziaĵoj de 6 spiritaĵoj aŭtoroj, inter kiuj L.L. Zamenhof, en Esperanto mediume ricevita per Lorenz mem; kaj la dua parto konsistanta el 18 poeziaĵoj de pluraj spiritaĵoj aŭtoroj, esperantigitaj el la libro **TRANSTOMBA PARNASO**, psikografie ricevita per la mediumo Francisco Cândido Xavier, eldono de la Brazila Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro. La verko prezentas longan antaŭparolon de Ismael Gomes Braga pri mediumeco kaj Spiritismo. La literatura valoro de tiu libro estas reliefigita de **LA NICA LITERATURA REVUO**, en ĝia n-ro 5, de la jaro 1965, kie estis transskribitaj el tiu libro du poemetoj, kiel modeloj de bela poeziaĵo.

- 40 — BHAGAVAD-GITĀ, TIO ESTAS, SUBLIMA KANTO PRI LA SENMORTECO, traduzido para o Esperanto do original em sânscrito, FEB, Rio, 1942.
- 41 — ANTOLOGIO DE BRAZILAJ POETOJ, obra póstuma, cujo manuscrito foi preparado a pedido da Liga Brasileira de Esperanto.
- 42 — AL LA DEKA BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO, poema dedicado ao 10º Congresso de Esperanto. Edição da FEB, em 1945.
- 43 — KOMPLETA GRAMATIKO DE LA TUPIA LINGVO. São trinta páginas deixadas pelo Autor, e não publicadas.
- 44 — KLASIFIKO DE LA BRAZILAJ INDIANOJ. Manuscrito em 40 páginas, não publicadas.

d) Lingüística

- 45 — GRAMÁTICA TUPI-GUARANI, não publicada.
- 46 — A MENTALIDADE AMERÍNDIA, esboço psicológico e lingüístico da mentalidade do índio americano, Ed. "Pensamento", 1938, São Paulo.
- 47 — INICIAÇÃO LINGÜÍSTICA, mistérios, leis e curiosidades da língua humana, Ed. "O Pensamento", 1929, São Paulo.
- 48 — MONOGENISMO LINGÜÍSTICO, não editada.
- 49 — VOCABULÁRIO BASCO-PORTUGUÊS, não editada.
- 50 — VOCABULÁRIO MAIA-PORTUGUÊS, não publicada.
- 51 — VOCABULÁRIO NAHUATL-PORTUGUÊS, não publicada.

- 40 — BHAGAVAD-GITĀ, TIO ESTAS, SUBLIMA KANTO PRI LA SENMORTECO, esperantigita el la sanskrita originalo, Brazila Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro, 1942.
- 41 — ANTOLOGIO DE BRAZILAJ POETOJ, postmorta verko, kies manuskripto estas preparita laŭ peto de la Brazila Esperanto-Ligo.
- 42 — AL LA DEKA BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO, poemo dediĉita al la 10-a Brazila Kongreso de Esperanto. Eldono de la Brazila Spiritisma Federacio, 1945.
- 43 — KOMPLETA GRAMATIKO DE LA TUPIA LINGVO. Ĝi konsistas el 30 paĝoj postlasitaj de la Aŭtoro, kaj ne publikigitaj.
- 44 — KLASIFIKO DE LA BRAZILAJ INDIANOJ. Manuskripto de 40 paĝoj, ne publikigita.

d) Lingvistiko

- 45 — GRAMATIKO TUPIA-GVARANIA, ne publikigita.
- 46 — LA INDIANA MENSOSTATO, psikologia kaj lingvistika skizo de la mensostato de la amerika indiano. Eld. "Pensamento", 1938, São Paulo.
- 47 — LINGVISTIKA INICADO, misteroj, leĝoj kaj kuriozaĵoj de la homa lingvaĵo. Eld. "O Pensamento", 1929, São Paulo.
- 48 — LINGVISTIKA MONOGENISMO, ne eldonita.
- 49 — VORTARO VASKA-PORTUGALA, ne eldonita.
- 50 — VORTARO MAJAA-PORTUGALA, ne publikigita.
- 51 — VORTARO NAHUATLA-PORTUGALA, ne publikigita.

e) Diversas

- 52 — ESTENOGRRAFIA IDEAL. Sistema taquigráfico português. Ed. "Pensamento", 4a. ed. 1934, São Paulo.
- 53 — RECEITUÁRIO DOS MELHORES REMÉDIOS CASEIROS, Ed. "Pensamento", diversas edições, São Paulo.
- 54 — HOMEOPATIA DOMÉSTICA BRASILEIRA, Ed. "Pensamento" diversas edições, São Paulo.
- 55 — ENSINOS PTERNOS, poesias cívicas para a juventude, edição da Livraria Selbach, em Porto Alegre, RS.
- 56 — MINHAS MEMÓRIAS, manuscrito deixado em tcheco, não editado.

IV — BIBLIOGRAFIA SOBRE FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ

- 1 — Zêus Wantuil, GRANDES ESPÍRITAS DO BRASIL, FEB, Rio, RJ, 1969, pp. 337/339.
- 2 — Wallace Leal V. Rodrigues, homenagem ao I Centenário de Nascimento (1872-1972), ANUÁRIO ESPÍRITA — 1972, IDE, Araras, S.P., pp. 207/210.

* * *

Registramos, aqui, os nossos agradecimentos à colaboração prestada pelo Sr. Waldomiro Lorenz, através dos valiosos subsídios fornecidos sobre a vida e a obra do seu ilustre pai, sem o que seria difícil reunir as informações que oferecemos aos nossos caros leitores.

e) Diversaĵoj

- 52 — IDEALA STENOGRRAFIO. Portugallingva sistemo de takigrafio. Eld. "Pensamento", 4-a eld. 1934, São Paulo.
- 53 — RECEPTARO DE LA PLEJ BONAJ HEJMAJ MEDIKAMENTAJ, Eld. "Pensamento", pluraj eldonoj, São Paulo.
- 54 — BRAZILA HEJMA HOMEOPATIO, Eld. "Pensamento", pluraj eldonoj, São Paulo.
- 55 — PATRAJ INSTRUOJ, patriotismaj poeziaĵoj por la junularo; eld. de la "Livraria Selbach", Porto Alegre, RS.
- 56 — MIAJ MEMORAĴOJ, manuskripto en la ĉeĥa lingvo, ne eldonita.

IV — BIBLIOGRAFIO PRI FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ

- 1 — Zêus Wantuil, GRANDAJ SPIRITISTOJ DE BRAZILIO, Brazila Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro, RJ, 1969, pĝ. 337/339.
- 2 — Wallace Leal V. Rodrigues, artikolo omaĝe al la I Centjara Datreveno de Naskiĝo de Lorenz (1872-1972), SPIRITISMA JARLIBRO — 1972, Instituto de Difusão Espírita, Araras, SP, pĝ. 207/210.

* * *

Tie ĉi ni registras nian dankon pro la kunlaboro de S-ro Waldomiro Lorenz, pere de la gravaj elementoj de li liveritaj pri la vivo kaj verko de lia eminenta Patro, sen kio estus ja malfacile kunigi la informojn, kiujn ni oferas nun al niaj karaj legantoj.